# EKO

**Esperiga Komuniko**

**Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado**

*EKO 2020-47 sendita el Budapeŝto,*
*la 27an de septembro*

## Enhavo


- AMO pluiras ankoraŭ virtuale!
- Moderna gramatika savilo
- Kvinpetalo persistas
- Ĉina intervjuo en Makao
- Persa kurso je dispono



Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# AMO pluiras ĝis la jarfino

- AMO 67: okt 2-3. 'Konkretigo de daŭripovo' (KEAST, Modra-Harmonia, Slovakio): virtuala.
- AMO 68: okt 27 kaj 29. 'La rolo de Esperanto-Centroj' (Greziljono, Francio): ĉeesta/ virtuala.
- AMO 69: Malfru-novembre.'Varbado de junuloj en Eŭropo' (Pollando, Wroclaw), virtuala.

La 67a seminario pri Aktivula Trejnado okazos kadre de la scienc-teknika kunsido KAEST, jam renoma tra multaj jaroj. Ĝia temo estas pri daŭripovo, por kiu UN proklamis 17 ĉef-celojn (alkroĉita). Do, la temo de AMO 67 provas kunigi konkretajn ideojn por la kontribuo al la plenumo de tiuj celoj. Unu kontribuo estos pri la favora rolo de fervojoj por energiŝparado kaj uzo de renovigeblaj energifontoj.

La 68a seminario okazos kadre de la aŭtuna sesio en la kulturcentro Greziljono. Eo-Centroj klare ludas grandan rolon, sed ili estas nebone konataj kaj ege diverstipaj – iuj estas simplaj oficejoj, iuj ofertas kursojn, iuj havas bibliotekojn, iuj… la listo senfinas. Kerna tasko en tiu seminario estos formuli saĝajn demandojn por enketilo al Centroj, por finfine kompreni la vastecon de tiu nia rimedo. La seminarioj okazos marde kaj ĵaŭde, inter 16:00 kaj 18:30 CET. Somera tempo en Eŭropo finiĝas en dimanĉo la 25an de oktobro. Kontribuos s-ino Zsófia Kóródy pri la konata Eo-centro en Herzberg-am-Harz kaj ĝia ĝemela aranĝo kun Góra en Pollando. Pliaj informoj pri la kulturcentro: gresillon.org/agendo

La 69a seminario estas la postsekvo de la prokrastita seminario el septembro. Restas la sama temo, sed kun pli da tempo por aktivaj kontribuoj, precipe de TEJO.

# Gramatika gvidilo

Ĉu vi iam dubis, ĉu vi ĝuste uzas la akuzativon? Ĉu vi ne certas, kiam uzi la artikolon 'la'? Ĉu vi havas iujn ajn demandojn pri la gramatiko de Esperanto?

**Jen la solvo – antaŭmendu la novan eldonon de la fama *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko –* PMEG 2020!**

PMEG estas **la** verko pri la Esperanto-gramatiko, kiu devas ne manki en via libroŝranko!

Ĝi estas verko por ordinaraj esperantistoj, kiuj volas detale studi la gramatikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo




PMEG 2020 estas profunde tralaborita eldono. En preskaŭ ĉiu sekcio ĝia aŭtoro Bertilo Wennergren faris korektojn aŭ kompletigojn, kaj iuj gravaj sekcioj estas preskaŭ tute reverkitaj laŭ novaj eltrovoj kaj ideoj.

Nur por la antaŭmendoj validas la **speciala prezo de PMEG – 28€**! Sendokostoj kalkuliĝas aparte.

Dum oktobro E@I presos la libron kaj tuj dissendos ĝin al la mendintoj. Do hastu – ricevu la novan PMEG jam novembre por povi donaci ĝin al iu esperantisto (aŭ rekte al vi mem)!

Aldone vi ricevos ankaŭ PDF-version de la libro por ĉiam havi ĝin en via poŝo – plene senpage!

Eksciu pli pri la papera PMEG 2020 kaj antaŭmendu **vian** libron ĉe pmeg.ikso.net!

## Kajto kantas sentime kaj senteme

Dum la pasinta periodo ni multe laboris por fari kant-videon. Multaj gast-muzikistoj helpis nin.
Nun la video estas preta kaj ni publikigis ĝin en YouTube. Ni ne nur prezentas la Kant-videon 'Sen Timo' sed ankaŭ la Manifeston 'Sen Timo'. Por tiu manifesto ni kolektas tradukojn en multaj lingvoj de la frazo: <EO - En paco ludi - sen timo kuregi, salti, danci kaj kanti ... estas rajto de ĉiu infano!>
'Sen Timo', la kant-video de Kajto: https://www.youtube.com/watch?v=oleyMmMYyOM

Ankie & Nanne de Kajto

## Pakistana kurso

Jen estas la unua leciono de Baza Kurso de Esperanto en nia *youtub*-kanalo nome "Espetanto.pk"
https://youtu.be/l9USq8J1usQ

Shabbir Ahmad Sial.




## Ĉina informado

Intervjuo de Chen Ji (komitatano de UEA) en portugallingva gazeto de Makao, Ĉinujo.

https://jtm.com.mo/actual/principal-revista-da-unesco-versao-em-esperanto/

## Kvinpetalo proponas studojn

Baldaŭ okazos en Kvinpetalo du paralelaj studsesioj, de la 19a ĝis la 23a de oktobro.

Por komencintoj kaj progresantoj, kun Catherine Kremer: paroligaj ekzercoj pri diversaj temoj, kaj multaj ludoj!

Por tiuj, kiuj jam iom regas la lingvon, iom da enprofundiĝo en la kulturo esperanta, kun Brian Moon: konatiĝo kun verkoj de Julio Baghy, Claude Piron, Liven Dek kaj Roman Dobrzynski. Kaj diversaj lingvaj ekzercoj, por praktiki la lingvon skribe kaj parole.

Detaloj ĉe http://www.kvinpetalo.org/

## Internacie konata kurso nun en la persa lingvo




La libro de Stano Marĉek "Esperanto per rekta metodo" en la persa "Esperanto bā raveš-e mostaqim" tradukita de S.Baluĉi nun estas mendebla el la katalogo de UEA. La libro estas mendebla en du formoj: -- papere je 7.50 € ĉe:

https://katalogo.uea.org/?inf=9810




-- elektronike en pdf formato kune kun la voĉlegitaj tekstoj en mp3 formato je 15.00 € ĉe: https://katalogo.uea.org/?inf=9811

======= Vortoj: 875 ======

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.